EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 69> ● ZPI ● Guglo ● Hispanio ● Kursoj IT, PL ● Brazilo ● S < dec. 9**

# ZPI zipas por vi Z-tagajn afiŝojn

Laboras senĉese la grupo ZPI de UEA pri informado, por festi la sekvajn Tagojn:

**2022 decembro 10: Tago de Homaj Rajtoj,**

**2022 decembro 15: Zamenhof-Tago, Tago de la Esperanta Libro.**




Afiŝoj:
- EO: http://www.linguistic-rights.org/zamenhof-tago/2022/2022-dec-10-15-afisho-EO.jpg
- ES: http://www.linguistic-rights.org/zamenhof-tago/2022/2022-dec-10-15-afisho-ES.jpg

(alilingvaj sekvos)

http://www.linguistic-rights.org/unesco/unesko.html#Zamenhof2017

Stefano Keller

# Akiru grandan krediton por reklamoj en Google

Google Grants ofertas subvencion de ĝis **10 mil dolaroj monate** por ne-profitcelaj organizoj je la formo de senpagaj reklamoj ĉe Google Adwords. Tio signifas, ke via asocio ne ricevos monon, sed krediton por fari reklamojn en Google ĝis la valoro de 10 mil dolaroj monate. Per tiu granda sumo, vi povos amase disvastigi en via lando Esperanton.
Spektu videon kun klarigoj: https://youtu.be/zb1cZIE9WuA
Se vi interesiĝas pri tiu eblo, legi la dokumenton: https://gazetaro.org/grants

# Pliaj kursoj, Mantova, Italio, Poznano, Pollando

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: tria-grada kurso
Gvidantonomo: Laura Brazzabeni
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Mantova, Italio.
Aldoninto: brazza

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27489

Nomo: Adam Mickiewicz-Universitato
Gvidantonomo: Ida STRIA
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Poznano, Pollando
Aldoninto: calderon_b

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27490

# Artikoloj de ESF

Pilar Requejo de Lamo: Esperantismo en Iberio: naciismo kaj internaciismo (1887–1928)
https://esfconnected.org/2022/11/28/esperantismo-iberio/

The future of linguistic diversity · La estontecto de lingva diverseco
https://esfconnected.org/2022/11/16/future-linguistic-diversity/

# La 3-a kurso por hispan-lingvanoj

La antaŭa Estraro multe laboris kaj kunlaboris por du eldonoj de la kurso por hispanparolantoj.

Mi aktualigas vin pri la progreso de la 3-a kurso por hispan-parolantoj, amerika agado de UEA partnere kun TEJO kaj Kolombia Esperanto Ligo.

La varba fazo finiĝis. Ni akiris de tio 431 aliĝintojn.

La kunordigantoj havas ĉi-jare la subtenon de 9 instruistoj:

Araceli, Carlos Lopez (Nova), Carlos Velasquillo, Daniel Cotarelo, Luis Obando, Moisés Herrera, Luis Eliver (Nova), Yair (Nova), - Doniben

Ni ne uzis pagatajn reklamilojn por allogi homojn, nur *Facebook*-afiŝaĵojn, KEL-retejon kaj "voĉ-al-voĉo". 342 aliĝis al baza kurso kaj 89 al meznivela kurso.

La landoj estas: Argentino, Bolivio, Brazilo, Bulgario, Kanado, Ĉilio, Kolombio, Kostariko, Ekvadoro, Salvadoro, Hispanio, Usono, Francio, Gvatemalo, Honduro, Meksiko, Peruo, Kongo, Dominika Respubliko, Urugvajo, Venezuelo.

Ĉi-jare alia novaĵo estas, ke ni uzas la socian reton *Discord* por arigi la grupon. Ni esperas per tio ankaŭ kreskigi la uzon de *Discord* en UEA. Sed ĝi ne funkcias bone por pli grandaj grupoj, ni ankaŭ uzos *Google Meet* por la lecionoj.

Maniero subteni la kurson estas donaco al la Amerika Fondaĵo de UEA:

https://uea.org/alighoj/donacoj/ameriko - bona celo estus akiri 4000 EUR, ĉar tio helpas pri ĉiuj kostoj, inkluzive de aliĝo de kursanoj. Sed mi ne estas tre espera pri tiu atingo, tamen.

Fernando Maia Jr. <fmaiajr@gmail.com>

SMG: Ni spertis en 2020 kaj 2021, kiel tiu kurso kreskigis la membro-nombron de UEA. Espereble okazos ankaŭ por 2023.

## Ĉina foto-konkurso lanĉita

En la 21-a de decembro okazos la 40-a Komuna Seminario gastigita de la Ĉina Esperanto-Ligo, ni kun granda honoro invitas vin aliĝi al la evento (https://www.chinaesperantoligo.com.cn/ks2022/)
Ĉu vi havas interesajn fotojn pri Ĉinio: estas bonvena partopreni en foto-konkurso, la premiitoj havas ŝancon ricevi premion de 200 eŭroj kaj libroj, jen detalaj informoj:
https://www.chinaesperantoligo.com.cn/ks2022-fotokonkurso/

La pandemio malhelpas internacian vojaĝon, sed ne memorojn kaj malkovrojn! Dum KS 2022 okazos **foto-konkurso** kun la temo **Mia Rakonto pri Ĉinio**. Ni esperas, ke homoj povas malkovri la mirindajn momentojn en la vivo kaj la mirindan mondon en la lenso en sia ĉiutaga vivo. Vi povas sendi:



- Fotojn pri via vojaĝo/studo/laboro en Ĉinio
- Fotojn pri via amiko rilate al Ĉinio
- Fotojn pri elemento aŭ via inspiro rilate al Ĉinio.

Vi povas kontribui per maksimume 3 fotoj. Sendu la materialon al **redaktoro_de_chel@163.com** kaj nomu vian mesaĝon per "Foto-konkurso+nomo". La limdato por sendi viajn fotojn estas **decembro** 2022. Ĉiuj rajtas kandidatiĝi, sendepende de aĝo, lando aŭ partopreneco de KS. Sendu fotojn faritajn de vi mem, pli bone sen redaktado, kun klarigo aŭ rakonto pri la foto, ekzemple la enhavo, inspiro, personaj sentoj de la foto, ktp., maksimume 300 vortoj.

La fotoj ne devas enhavi perforton, pornografion, malobservon de privateco de aliaj homoj kaj malobservon de koncernaj naciaj leĝoj kaj regularoj.

ĈEL rajtas uzi la fotojn por ajnaj neprofitcelaj celoj kiel presado kaj disvastigo. Se kandidatoj sendas la fotojn, tio signifas ke ili obeas la regularon de ĉi tiu foto-konkurso.

Ni bonŝance ricevis subvencion kaj preparas donacojn por premiitoj.

- La unua premio (1 homo): €200 + libroj
- La dua premio (2 homoj): €100 + libroj
- La tria premio (5 homoj): €50 + libroj
- Kelkaj memorpremioj: libroj

Chen Ji, Direktoro de Oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo
Komitatano A de Ĉina Esperanto-Ligo
Tel: 86 10 68996130 ; 13126784506, Adr. P.O.Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio

## Fotoj el Greziljono

- Staĝo Printempas: Mireille (33)
- 70-jariĝo: Xavier (51)
- Infana semajno : Xavier Godivier (91)
- staĝo Aŭtunas : Xavier Godivier (63)

Vi povus iĝi unu el ĉ. 250 societanoj kaj tiel posedi "brikon" de la kastelo. Legu en gresillon.org/societano

Ni ĝojus legi vian opinion, kio funkciis aparte bone aŭ aparte malbone.

M.C.E - Maison Culturelle de l'Espéranto
1310 route du Lude, Grésillon – Saint Martin d'Arcé–FR- 49150 Baugé en Anjou – France
Téléphone : 02 41 89 10 34 (répondeur), Courriel : kastelo@gresillon.org

Site : gresillon.org

## Muzika trezoro protektata

Ĉi-semajne en **Brazila Kolekto** aperis tri novaj videoj, kaj du el ili estas de originalaj komponaĵoj en Esperanto!. Laŭ niaj enketoj, unu el la plej ŝatataj enhavoj de nia retejo estas la videoj, kaj multego da homoj preferas komponaĵojn. Do, jen ambaŭ!

Unu estas kunlaboraĵo de du elstaraj brazilaj esperantistinoj: **Dirce Sales** kaj **Maria Nazaré Laroca**, titolita *Ne*. Alia, *Bruneta saŭdado*, estas verkita de **Flávio Fonseca** pri poemo de la elstara poetino **Cacá Neri**, kaj registrita en portugallingva vinila albumo en la 80-aj jaroj. Nun, finfine, aperas ĝia esperanta versio.

Oni publikigis ankaŭ videon kiun **Eveline Paŭla** faris el traduko fare de **Jair Sales** de la skota tradicia kanto *My Bonnie lies over the ocean*. (Mia karulino troviĝas transoceane).

Kaj laste sed tute ne balaste, vidu tradukon kiun faris la nuna prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, nia kara **Querino Neto**, el famega verko de **Chico Buarque**, originale *O que será*.

========= vortoj: 1005 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.